Joseph Freiherr von Eichendorff,

# La rompiĝinta ringeto

*tradukita de Chr. Pfeufer*

En ombra valo turnas
muela rado sin.
Jen loĝis mia kara -
ŝi nun forlasis min.

Fidelon ŝi promesis,
ringeton donis ŝi:
Fidelon ŝi forgesis,
rompiĝis ring' de mi.

Migradi mi dezirus
for, kiel muzikant';
kaj kie ajn mi irus,
resonus mia kant'.

Mi volus bataladi,
rajdante tra l'kampar',
ĉe l'fajro dormkuŝadi
dum nokt' en la tendar'.

La rado plu rondiras;
revante aŭdas mi.
La morton mi sopiras,
kvieton donus ĝi.

*Traduko de la Germana poemo "In einem kühlen Grunde" de* Joseph Freiherr von Eichendorff *(∗1788-03-10 – †1857-11-26) en Esperanton de Chr. Pfeufer.*

*Arg-1035-2101 (2014-05-31 17:34:45)*

*Tiun ĉi kanto-tradukon mi, Manfred Retzlaff, trovis en la libro "Internacia Kantaro", eldonita en 1922 de la eldonejo Ferdinand Hirt und Sohn en Lepsiko (Leipzig), Germanio. La kantojn kolektis kaj eldonis Paul Bennemann, sur la paĝo 22 kaj 23. Erare estas indikite tie, ke la poeziaĵon verkis Wilhelm Müller.*

Joseph Freiherr von Eichendorff,

# Convalle in rorata

*tradukita de N. N. 95*

Convalle in rorata,
En, rota crepitat;
Puella mi amata
Hic iam non habitat.

Que fides erat pacta
Donato anulo,
Ab illa iam est fracta
Cum dono aureo.

Cum lyra peragrare
Nunc velim ultima
Et cantica cantare,
Adire ostia!

Nunc volem datis loris
In atrox proelium,
Ad ignes cubem foris
Obscura nocte tum!

Cum crepant rotae tortae,
Quid velim, nescio;
Ac si occumbam morte,
Sit quies subito.

*Traduko de la Germana poemo "In einem kühlen Grunde" de* Joseph Freiherr von Eichendorff *(∗1788-03-10 – †1857-11-26) en la Latinan de N. N. 95.*

*Arg-1035-2103 (2014-05-31 18:16:34)*

*Tiu ĉi latinigo troviĝas en* `http://ingeb.org/Lieder/ineinemk.html` *.*